



Go-Amiko

**Informilo de
Japana Esperantista Go-Asocio
N-ro 147, Aŭgusto 2016**



Go en Movada Foiro en Nitra



La 101a UK okazis en la urbo Nitra, Slovakio. La 23an de julio (sabate) okazis Movada Foiro, en kiu 100 diversaj grupoj prezentis sian agadon. Ankaŭ mi prezentis go-ludon.

Dum la kongreso mi planis prezenti go-on en la komuna salono, sed mankis taŭga tablo kaj mankis ankaŭ etoso, do mi ne povis prezenti.

Go-kunsido en la 64a Kansaja Esperanto-Kongreso

La 18-19an de junio 2016 okazis la 64a Kansaja Kongreso en Osaka. La 19an oni okazigis la Go-kunsidon, en kiu partoprenis la respondeculo s-ro Mori kaj la aliaj 5 homoj. Unu el ili estis komencantino, al kiu Mori instruis go-on per 9-voja tabulo. Ŝi trovis go-ludon interesa. Li donis al ŝi ludilon kaj la libron “Invito al Goo” senpage. Spertuloj ĝuis ludon kontraŭ komputila programo “Zenito n-ro 3” aŭ inter la aliĝintoj.

D-RO EMANUEL LASKER KAJ LA GOLUDO

*Multfarba rakonto de Bruno Rüger
el la komenca periodo de goo en Eŭropo,
verkita de Ger HANSSEN*

En Nederlando multe de goo-kluboj ankoraŭ uzas la terminon "klaso" por indiki sian goo-lertecon, anstataŭ "dan"-on aŭ "kyu"-on. Oni povas diri, ke tio estas nederlanda tradicio malgraŭ la mallonga historio de goo ĉi tie. Tamen la termino ne devenas de Nederlando, sed de Germanio, en kiu oni hodiaŭe devas longe serĉi antaŭ ol trovi ĝin. Bruno RÜGER estas la homo, kiu enkondukis ĝin.

Se vi miras pri kial goo-tabuloj en Eŭropo ne uzas literon "j" en la koordinatoj, tio ankaŭ estas lia verko. La kaŭzo estas la simileco de literoj "i" kaj "j" en tiu tempa germana manskribo. Simile, oni povas demandi, kial la Eŭropa Somera Goo-Kunveno estas nomita "Eŭropa Goo-Kongreso". Ankaŭ pro tio RÜGER estas respondeca. Fakte, la Usona Somera Go-Kunveno simile nomiĝas "American Go Congress". Mi iam demandis la organizanto de la unua AGC pri la kialo de tiu nomo. Li devis pensi iomete kaj li diris pro simileco de la Eŭropa Go-Kongreso. Eĉ en Japanio 2016 oni organizas "Japanan Go Kongreson"!

Estas klare, ke li bezonas pli proksiman atenton. RÜGER estis entuziasma kaj amebla homo. La personaj memoroj de RÜGER al liaj renkontoj de d-ro Emanuel LASKER klopodas illustri tion. LASKER tiutempe estis mondo-ĉampiona ŝakisto. Tiu ĉi estas traduko de artikolo el la Orienta Germana Go-Revuo. Bedaŭrinde mi nur havas kopion de ĝi sen mencio de la jaro.

Bruno Rüger rakontas:

En milita jaro 1918 mi aŭdis, ke LASKER estis interesita pri goo.

Mi tiam korespondis kun s-ro PFAUNDLER, profesoro de fiziko de universitato de Graz, pri sia goo-lerno-libro, kiu aperis en 1908. Cetere mi aŭdis, ke li eldonis goo-revuon en 1909. Tiu ĉi revuon ne atingis pli ol dek eldonaĵoj pro malmulto de abonoj. Li oferis al mi jaro-eldonaĵon. Mi rare dezirante atendis poŝtan sendaĵon kiel tio. Ja estis la unua goo-literaturo, kiun mi ricevis apud la lerno-libro. En la adresaro de legantoj mi trovis la nomon de d-ro Emanuel LASKER.

Du jarojn poste, Patro Kristnasko alportis al mi libron "Libro de 1000 mirakloj". Apud multaj belegaj aferoj, ankaŭ estis ĉapitro pri la ŝakludo. La eldonisto havis kelkajn demandojn por la mondo-ĉampiono. Unu de ili estis: "Ĉu ŝako kontentigas la kondiĉon por esti la ekstrema provo de sagaceco, aŭ ĉu en futuro iu alia ludo kun pli subtilaj reguloj povas anstataŭigi ĝin?" LASKER surprize respondis: "Mi ne rigardas ŝako kiel la ekstremo rilate la breto-lodoj. Mi ekzemple antaŭvidas pli bonajn ŝancojn por goo." Tiu ĉi opinio indikis, ke LASKER ĝisfunde pli-profundiĝis en goo.

Kiam mi revivigis la goo-revuon en 1920, LASKER denove estis abonanto. Mi dezire volis ludi kontraŭ tiel grandega kontraŭulo. En Dresden mi kolektis malgrandan aron de goo-amantoj kaj komencantoj en mia ĉirkaŭaĵo, al kiuj mi favoris plimultajn de handikapaj ŝtonoj.

Je tiu tempo mi cetere ankaŭ estis fervora ŝakludanto ĉe la Dresdena ŝako-klubo, de kiu mi estis sekretario. Oni volas inviti ŝako-ĉampionon LASKER por ludi simultanon kaj mi interŝanĝus la leterojn. Samtempe pensado ekestis de eble inviti lin por ludi partion de goo kun mi. Tamen, je kiu pago? Post multe da pensado mi diris al mi mem: "Tiel okazo mi neniam havos iam" kaj mi oferis lin 20 Markojn. Neniam antaŭe mi elspezis tiel multe da mono por tiel lukso.

LASKER ne tuj respondis. Tiel venis la dimanĉo, dum kiu en la posttagmezo la simultano okazis. Por mi ne estis tre multe da preparoj, pro tio mi okupis min pri laboraĵoj ne tre puraj en la kelo. Kiam mi, kun malpuraj manoj, portis karbo-sitelojn supren, estis sinjoro antaŭ mia porto, kiu de malantaŭe similiĝis LASKER. Kiam li sin turnis la

simileco devenis sameco.

Mi ne sentis tre bone je tiu okazo kaj mia edzino eĉ malpli! Ne, ĉar ŝi timis virojn, sed estis malfacilaj tempoj, dum kiu, nur ĵus antaŭ la inflacio, kiam ne estis facile fari dimanĉan manĝaĵon por eĉ nur du personoj. Sed nun ĵus unu horo antaŭ ol la tagmeza manĝaĵo venis ne anoncita gasto. Eĉ fameca gasto! Feliĉe la pecoj de gulaŝo ankoraŭ ne estis tiel malgrandaj, ke ili ne povas esti denove tranĉitaj. Kaj estis sufiĉe da akvo, tiel ke la saŭco estis facile diluita. Kompreneble la saŭco estis pli-valorigita kun butero kaj lardo, tiel ke vere estis pli ol dudek okuloj, kiuj naĝis en ĝi. Ni pensis, ke la simpla manĝaĵo bon-gustis por mia gasto.

Kaj poste, kiel post-manĝaĵo... partio de goo. Unua-foje mi sidis kontraŭ pli-forta kontraŭulo. Kiu ne estus ekscitita? Tamen rapide klariĝis, ke mi havis iom pli da lerteco kaj finfine mi sukcesis venki lin. La 20 markojn la majstro ridetante reen ŝovis.

Dum la sekvontaj jaroj LASKER aliĝis al la plej fortaj Berlinaj ludantoj kaj pro tio lia lerteco rapide pli-fortiĝis. En mia goo-revuo mi ĉiujare menciis mian ferian ejon kaj ĉiam estis kelkaj samideanoj, kiuj iris tien je la sama tempo. La unua de tiuj Goo-Kongresoj estis en 1927 en Ilmenau. La nombro de kunvenantoj oni povis tiam nombri per rigardo de unu okulo. Nombrante kun dozenoj, estis precize duono. Ankaŭ LASKER estis unu de ili kaj tiam li bezonis nur 2 aŭ 3 ŝtonojn de nia plej lerta ludanto.

Rakontende estas cetere, ke kaŭze de niaj goo-luktoj Ilmenau-a enloĝantino preskaŭ mortis! Ni vespere ludis en kafejo kaj poste eĉ nokte kaj ni ankoraŭ ne volis ĉesi, tamen ni devis eviti la aŭtoritaton, ĉar la deĵoranta policisto ekhavis sian aŭtoritatan mienon antaŭdire de malakcepti ĉiun subaĉeton kaj poste minacante kraketis sian sablon. S-ro Dueball, la plej amenda de ni, proponis plue ludi en lia loĝejo, kiu ni unuvoĉe entuziasme renkontis.

Lia gastigantino ankoraŭ estis vigla kaj ŝi alportis la bezonatajn tre diverse formitajn seĝojn, sed cetere ŝi ne montris iu ajn ĝojon pro la

malfrua vizito. Kiam S-ro Dueball demandis: "Ĉu vi povas fari iom da kafo por ni?, ŝi terurite kriis: "Nun? Meze de la nokto?" Apopleksion ŝi nur ĵus evitis, sed ne mankis tre multe! S-ro Dueball diris, ke ŝi estis iom ŝokita dum kelkaj tagoj poste, kaj kiam li foriris, ŝi diris, ke ŝi neniam plu akceptus goo-ludantaj somerajn gastojn en sia domo. Ŝi persistis tion kaj je la momento ŝi ankoraŭ vivas.

LASKER partoprenis la goa kunveno de 1930 en Rathen (Saksa Svisio en Germanio) kaj tie li menciis ŝercante al la go-ludantaj ĉeestantoj: "Ĉu vi scias, ke s-ro Rüger iam oferis al mi 20 markojn por partio?" En la rango-listo de germanaj goo-ludantoj li supreniris jam eĉ pli. Li eĉ fervore studis teorion de goo kaj li skribis por la Germana Goo-Revuo artikolon pri verko teme de handikapaj ŝtonoj.

En 1931 aperis la de ĉiuj breto-ludantoj suspense atenditan libron "Breto-ludoj de la popoloj". En ĝi li pritraktis goon eĉ pli profunde ol ŝako. La tuta mondo salutis ĉi tiun libron, sed eĉ pli ol la tuta mondo, Mi avidis ĝin. Mi jam publikigis kelkajn broŝurojn, kompendiojn kaj kompletajn lerno-librojn pri goo. Kiel tiel grandulo de la imperio de la breto-ludoj alproksimigus ĉi tian komision?

Mi ankoraŭ scias kiel hieraŭ, ja poŝtisto alportis la libron, malbonŝance ĵus kiam mia edzino vokis: "La bano pretas!" Mi kompreneble volis legi la libron. Mia edzino volis, ke mi banu. Ĉu mi lasus deveni familian dramon? Aŭ ĉu mi cedus denove? Venis liberanta, iom genia ideo. Mi obeeme iris bani, sed kun frapanta koro mi prenis la libron sub mia bano-mantelo. Neniam mi malvestiĝis tiel rapide kiel tiam. Pritrakti la libron en la bano estis iel laciga. La nova libro ja ne povis malsekiĝi. Pro tio mi devis supre teni miajn manojn, kiu ne plaĉis min kaj ankaŭ ne miajn manojn.

Cetere mia edzino ne devus esti maltrankviligita pro la malbruo en la bano-ĉambro, pro kio mi movis miajn genuojn farante spruĉantajn bruojn, kiuj vere devis funkcii. Post 20 jaroj de edzeco tio estis la unua klopodo de trompo. Pro tio mi ekhavis sincerajn inhibojn. Tamen estis sukceso. La malpurigado bedaŭrinde estis iom maltaŭga tiu-tempe. Mia

edzino poste konstatis kapo-skuanta, ke la akvo en la bano neniam estis tiel pura. Ankaŭ mi esprimis mian miron, tamen ne trovis iun klarigon.

*Tiel finas la rakonto de Buno Rüger pri lia renkonto de la goo-ludanta ŝako-majstro.

XXIV-a Esperantista KGS-Turniro

Matthias REIMANN

Karaj go-amikoj,
reveninte el niaj ferioj en Rostock ĉe Balta Maro, mi nun finfine volas doni al Vi la fintabelon de nia turniro.

Mi tre dankas al tiuj, kiuj ludis kontraŭ Algiskas alie ol ĉe KGS, ĉar li kun KGS havas malfacilaĵojn. Malgraŭ tiuj malfacilaĵoj li pro tio povis partopreni en nia turniro.

En tiu-ĉi turniro Cortex montris la plej bonan rezulton (4:1). Ne forgesu, ke nia fortaj ludantoj ĉiuj donis parte grandan nombron de handikapŝtonoj. Eble russ estus gajninta la neluditan partion - li, mi kaj nikopipe akiris bonajn finrezultojn je 3 aŭ 4 poentoj.

Kiel ĉiam mi aranĝis kiel duan la tabelon de la "veraj" potencoj.

La fina turnirtabelon de nia XXIV-a turniro:

1. Cortex	II D	-4	+3	+2	+6	+5	4
2. Morikin	II D	+6	+4	-1	-3	-7	2
3. ESPERANTO	1 K	-7	-1	+6	+2	-9	2
4. russ	4 K	+1	-2	+9	+7	?8	3
5. esgo	5 K	+8	+6	--	+8	+9	-1 4
6. Algiskas	5 K	-2	-5	-3	-1	+/-	1
7. nikopipe	8 K	+3	-9	+8	-4	+2	3
8. HegedusI	11 K	-5	--	+9	-7	-5	?4 1
9. dodosan	10 K	--	+7	-8	-4	--	-5 +3 2

Kaj la tabelo de la "veraj potencoj" (3-a kolumno: grado; 4-a kolumno: elirpoentoj laŭ grado; 5-a: gajnitaj partioj; 6-a: finrezulto)

1. Cortex	II D	21	4	25
2. Morikin	II D	21	2	23
3. ESPERANTO	1 K	19	2	21
4. russ	4 K	16	3	19
5. esgo	5 K	15	4	19
6. Algiskas	5 K	15	1	16
7. nikopipe	8 K	12	3	15
8. dodosan	10 K	10	2	12
9. HegedusI	11 K	9	1	10

Mi tre kore gratulas al la plej fortaj Cortex, Morikin kaj ESPERANTO!

La sekvonta turniro estas jubilara - la XXV-a. Varbu inter Viaj amikoj por ĝi. Ankaŭ alparolu ludantojn, kiujn Vi vidas en nia KGS-Esperantejo!

Havu ankoraŭ belan someron! Ĝis fino de aŭgusto!

Via Matthias / esgo (en KGS)

Pri Go-kunsido en la libro “Bonvenon en nia mondo”

En la UK en Nitra mi renkontis Bent Jensenius, kiu donacis sian libron al mi. La libro estas “Bonvenon en nia mondo” (Baza primovada lernolibro) eldonita de KAVA-PECH. En tiu ĉi libro ni povas trovi 27 diversajn movadojn de Esperanto, ekzemple Kastelo Grezijono, MONATO, Pasporta Servo, La Centra Oficejo, La Universala Kongreso, Bona Espero, Jarlibro de UEA kaj la Delegita Reto ktp. kun klarigo kaj dialogo. Do en la kurso oni povas uzi la libron, unue kiel legaĵon, kaj due kiel paroltrejnaĵon.

En la ĉapitro pri La UK, mi trovis min fotitan dum la UK en Florenco en 2006 kaj la vorton Go en la dialogo. Jen la dialogo:

Dialogo

(Kvar kongresanoj sidas en la kafejo kaj trinkas kafon kaj teon. Ili jam legis en la Kongresa Libro.)

K1 Ĉu ni iru kune al la diskuto pri la kongresa temo?

K2 Ne, mi deziras iri al la korea programero pri ŭonbulismo.

K3 Tio estas interesa.

K2 Ĉu ankaŭ vi iros tien?

K3 Ne, mi vizitis ĝin dum mia pasinta kongreso. Nun mi volas vidi prezentiĝon de AIS, t. e. la Akademio Internacia de la Sciencoj Sanmarino. Mi tre ŝatas viziti novajn programerojn, kiam mi ĉeestas kongreson.

K2 AIS tute ne estas nova.

K3 Por mi ĝi estas. Mi ĉiam havas la saman problemon dum UK. Mi volas partopreni en 3 aŭ 4 diversaj programeroj sam-tempe.

K4 Kiu estas la kongresa temo ĉi-jare? Mi tute forgesis.

K1 Lingvo kaj kulturo kaj, kaj, hm, kaj, hm, kaj tiel plu. Estas tre grava afero.

K4 Mi sam-opinias, sed Esperanto mem temas pri lingvo kaj kulturo.

K2 Ĉu vi akompanos min al la koreoj?

K4 Ne, mi iros al la kunveno pri la japana go-ludo. Mi promesis skribi etan artikolon pri ĝi en nia loka gazeto.

K1 Kio estas go-ludo? Mi multfoje aŭdis la vorton.

K4 Go-ludo similas iomete al ŝako. Ĝi originis el Ĉinio, sed nun-tempe ĝi estas pli populara en Japanio. Oni ludas ĝin ankaŭ en aliaj landoj, ekzemple en Eŭropo. Ĉu vi volas veni kun mi por vidi ĝin?


K3 Ne, ĉi-foje mi certe volas viziti AIS.

(La kvar kongresanoj finas trinki kafon kaj teon kaj iras en kvar diversajn direktojn.)

Go-ekzercaro por komencantoj (12)

N.Sakurai

Kiu meto mortigas la blankan ŝtonaron? Se la blanka ŝtonaro havas du okulojn, la ŝtonaro ne mortas. Kiel do senigi la alian okulon?





Respondo A: (bona)

N-1 estas ĝusta. Al B-2 per N-3 formiĝas falsa okulo kaj la blanka ŝtonaro mortas.


Respondo B: (Malbona)

Se Nigro metas N-1, Blanko metas B-2 kaj la blanka ŝtonaro vivas kun du okuloj.




La problemo 245-a

Nigro havas meton. Mortigu la blankan en bona procedo.



La problemo 246-a

Nigro havas meton. Mortigu la blankan en bona procedo.



La solvo 245-a

La blanka ŝtonaro mortas.

Fig. 1-a. (La solvo) N-1, N-3 estas bonaj. Sekvas plu de B-4 ĝis N-7. Tiel ambaŭ blankaj ŝtonaroj sufokiĝas kaj mortas.

Fig. 2-a. (Vario) Post B-4 de Fig. 1-a, al N-1 se B-2, sekvas N=3 kaptu, B-4 rekaptu de kvar nigraj ŝtonoj kaj Nigro re-rekaptas ĉe N-3. Poste Blanko ne povas formi du okulojn plu.




fig. 1-a.




fig. 2-a.

Fig. 3-a. (Malsukceso) Kiel estas tuj meti N-1? Tiam Blanko rezistas per alternekaptu metante B-2, kio estas malsukceso por Nigro.

Fig. 4-a. (Malsukceso) Ankaŭ N-3 ĉe B-4 estas malbona procedo. Same al fig. 3-a, Blanko rezistas per alternekaptu kiel B-4.




fig. 3-a.




fig. 4-a.

La solvo 246-a

La blanka ŝtonaro mortas.

Fig. 1-a. (La solvo) La meto N-1 estas nepra punkto. Sekvas de B-2 ĝis N-7 kaj la blanka mortas.

Fig. 2-a. (Vario) Al N-1 se B-2, do Nigro kaptas kiel N-3. Post tio a kaj b estas unu el la du.







Fig. 3-a. (Malsukceso) La tuŝmeto N-1 estas erara procedo. Blanko respondas B-2 kaj al minaco N-3 Blanko respondas B-4 kaj vivas oferante kvar ŝtonojn.

Fig. 4-a. (Aldone) Al N-1, se B-2 kapto, sekvas N-3, B-4, N-5 kaj la blanka ŝtonaro mortas.



Japania Esperantista Go-Asocio naskiĝis en la jaro 1979 kiel organizo de japanaj esperantistaj go-amantoj kaj subtenanto de Esperantista Go-Ligo Internacia, kiu celas disvastigi goon per Esperanto kaj Esperanton per goo.

La membronombro de la asocio kalkuliĝas ĉirkaŭ 40 konstante. La agado de la asocio estas okazigo de novjara go-kunveno kaj de go-kunloĝado en Esperanto-Domo de Jacugatake.

連絡先: 2-13-3 Ootone, Maebaši, Gunma, Japanio, 371-0825, Japanio
 Ĉe HORI Jasuo

12